



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

NOVEMBRO 2022 Kol. 450/38

XX

Enhavo: Lanĉo; J. Drahotová; Kongreso de ĈEA; Netruda informado;
Idiomoj; Bona Volo; Meditadoj el AMO; El la red.

XX

Jindřiška Drahotová lanĉis siajn tradukitajn librojn



La 21-an de marto 2022 kaj denove la 23-an de majo 2022 en la komunuma centro Klementinka okazis la lanĉo de libroj, kiujn tradukis Jindřiška el Esperanto en la ĉeĥan lingvon.

Foto: Zdeněk Kolín

La libro de rememoroj de Tereza Kapista: Zápisky z Íránu (Notoj el Irano) kaj la romano de Jules Verne: Mise (Misio). Kvarcent-paĝa publikigo, la librintervjuo pri Bona Espero faris pola ĵurnalisto kaj dokumentisto Roman Dobrzyński kun la direktorino de la samnoma infanhejmo. La orfejo ekde sia fondo en la j. 1957 en la brazila kamparo helpis al pli ol okcent forlasitaj infanoj danke al esperantlingvaj volontuloj el la tuta mondo.

La red.

25.11.1938 naskiĝis
Jindřiška Drahotová

En la historio de la ĉeĥa Esperantujo ne troviĝas tiom diligenta tradukanto de la Esperanta literaturo, kiel estas Jindřiška. Kiel ŝi mem esprimiĝis, por Esperanto ŝi estis kaptita nur en siaj 50aj jaroj... “sed ĝisoste – tiam malfermiĝis nova etapo de mia vivo“.

Dum de-tiama tempo ŝi okupiĝas pri jenaj taskoj: 1. Pri instruado de la Lingvo 2. Pri popularigo de la Esperantomovado (en neesperantista medio, cele al la politik-socia sfero) 3. Pri tradukado de Esperantaj presaĵoj (ĉefe libroj) en la ĉeĥan. La rikolto de ŝia longjara klopodo estas riĉa – ĝi atingis 13 librojn (certe ne fine!), krom aliaj presaĵoj – ĉu Esperantaj, ĉu ĉeĥlingvaj. La 4a sfero de la nelacigebla Jindřiška estas plej frapa kaj ĉemana: la redaktado de allogaj publikaĵoj, kiujn ŝi nomas „leĝaĵoj por miaj geamikoj“. Ŝi estas membrino de nia Asocio, do ni estas la unuaj legantoj de la publikaĵoj, kie ni trovas multon por informiĝi, cerbumadi, amuziĝi. La elekto de temoj plene respegulas la naturan karakteron de la aŭtorino. Kion ŝi esprimas, kion ŝi faras – ĉio ĉi estas plena de kompreno kaj empatio por la kunuloj.

Kio estas neforgesebla: La „seminarioj“ en Skokovy. Kaj reale kaj spirit-koncerne la Domo estis „tegmento“ por niaj kapoj same kiel por niaj spiritaj kontaktoj. La konstruaĵo ne staras plu – sed ni fermu la okulojn kaj malfermu la korojn – kaj revidu denove nian kolektivon, kies „gluaĵo“ estis kaj estas Jindřiška. Ni diru kun humuro, ke „el niaj (asociaj) vicoj ŝia merito kaj gloro disvastiĝis en la tutan Esperantujon“.

Gratulas ŝin la tuta AEH-asocio.

Margit Turková

Kongreso de ĈEA

En Pardubice okazis de la 16-a ĝis la 18-a de septembro 2022 kongreso de ĈEA, sub aŭspicio de urbestro inĝ. Martin Charvát. La programo de la kongreso estis vere bunta. Dum la membrokunveno oni elektis novajn komitatojn kaj prezidanton de ĈEA. Por la sekvantaj tri jaroj tio estas:



Jiří Tomeček – prezidanto

Libuše Hýblová – vicprezidantino, respondeca pri rilatoj kun

UEA kaj aliaj internaciaj kaj landaj Esperantaj organizaĵoj

Leonarda Chaloupková – respondeca pri organizado de konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj, laboro kun kluboj kaj sekcioj, rilatoj kun la publiko

Andrea Švubová – respondeca pri kaso, financaferoj, membro-datumbazo

Miroslav Malovec – ĉefredaktoro de STARTO, respondeca pri historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio

Josef Kalčík – respondeca pri junularo, retpaĝoj de Asocio, teknika subteno

Dum la kongreso oni povis ekscii pri novaĵoj el eldonejo KAVA-PECH, viziti la Libroservon kaj elekti el multaj titoloj, ĉu novaj, ĉu jam konataj.



La partoprenantoj povis ĝui teatraĵon „Ludoj kun diablo“ vi povas spekti ĝin ĉi tie:

<https://www.youtube.com/watch?v=AQBRC8AIq4U>), prelegon de Petr Chrdle pri la nunjara UK en Montrealo, kaj viziti la observatorejon. Oni povis partopreni promenon tra la urbo sub gvido de loka esperantisto Láďa Hakl, viziti la modernan fajrobrigadistan sidejon kaj vespere ĝui belan amuzvesperon kun muziko, dancado kaj loterio.

Danko por sukcesa aranĝo apartenas al ĉiuj organizantoj.

Mirka & Jirka Tomečkovi

Netruda informado pri Esperanto

Ĉiam tre grava okazo estas, se pri Esperanto interesiĝas neesperantistoj mem. Pri tio mi jam skribis en la artikolo pri la radioelsendo de *Maŝkaráda kolem smrti* (Maskerado ĉirkaŭ la morto) en la radiostacio ĈR 3. La radio mem petis permeson kaj en la retejo de la radio estas klare skribite, ke ĝin tradukis Jindřiška Drahotová el la romano originale verkita en Esperanto de Tivadar Soros. Kaj tio levis demandojn pri Esperanto.

Alia netruda maniero estas, se oni respondas pri io alia kaj la intervjuato uzos la okazon enmeti informojn pri Esperanto. Tion mi dum la lastaj semajnoj sukcesis trifoje: Ene de la intervjuoj por *Dobřichovické kukátko* (demandoj pri mia eldonejo), en *Tvůrčí život* (demandoj origine pri ekoturismo kaj vojaĝado) kaj en *Knihkupec* (pri mia eldonejo kaj lastaj eldonaĵoj); cetere, ĝi

devus esti post la 1-a de novembro disponebla senpage en ĉiuj ĉeĥaj librovendejoj.

Iam la monstro de Esperanto en kunteksto de alia ĉefa temo povas eĉ kaŭzi peton pri artikolo aŭ prelego temanta pri Esperanto: Jen du ekzemploj: Dum la solenaĵo de la tridekjariĝo de KAVA-PECH mi kompreneble multe parolis pri miaj Esperantaj eldonaĵoj kaj inter aliaj montris la novan Grandan Ĉeĥan-Esperantan vortaron de M. Malovec. Sekve mi estis petata de la redaktoro de *ToP* por interpretistoj kaj tradukistoj verki pri ĝi artikolon. Kaj ĝi aperis. Kaj mia prelego pri Ĉinio, Koreio kaj Japanio por *Právě teď!* (komunumo de pensiuloj), kie mi multe parolis pri miaj travivaĵoj per Esperanto kaŭzis peton de plia prelego (ĉi-foje rete por ne nur praganoj) pri la temo Esperanto kiel peranto de kulturo.

Certe estas ankaŭ multaj aliaj efikaj informkanaloj, sed mi volis montri iujn miajn spertojn. Gravas tamen, ke oni Esperanton ne trudu, sed infektu legantojn aŭ aŭskultantojn pri ĝi pritraktante alian temon. Tio multe pli efikas. Espereble kontraŭ tiu infektado oni ne elpensos vakcinon!

Petro Chrdle

Malbono estas kiel viruso

Unu indiana idiomo diras, ke ĉiu homo havas en si du lupojn – malbonan kaj bonan.

Prosperas tiu lupo, kiun ni nutras pli bone. Tial ni ĉiutage devus plensatigi la bonan... Kiamaniere? Nu eble per tio, ke ni al iu deziras „ĉion bonan“ (eble nur en la pensoj).

La malbonan lupon ni lasu plenkreski...

Negativaj pensoj estas kiel marĉo – forglutas la homon, se li ne

tuj alkrias helpon.

La plej alirebla (sed ne plej facila!) maniero estas prizorgadi bonajn kontaktojn. Ja, pri la pozitivaj emocioj oni devas sin trejni.

Pere de rideto, pere de nebombasta ludo aŭ kareso. Grave estas konsciiĝi, kio por mi estas ĝoja kaj celkonscie priflegadi la bonan humoron...

El ĉeĥa presaĵo; modifis, esperantigis M.T.

Bona Volo



En la jaro 1984 José de Paiva Netto, prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), iniciatis la defion starigi la Templon de Bona Volo (TBV), en Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo. Kaj nuntempe ĝi estas la monumento plej vizitata en ĉi tiu urbo laŭ oficialaj datumoj de la Ŝtata Sekretariejo pri

Turismo de la Federacia Distrikto – SETUR-DF.
Per bele ilustrita raporto en la Blogo Paiva Netto,
vi konos la elstarajn etapojn en la konstruado de
tiu avangarda, mirindega kaj tute ekumena
Templo. **Nepre vidu ĝin!**

*Kaj por la 33-jariĝo de TBV, kiu okazos la 21-an
de Oktobro, ni kore invitas vin, responde al tiu
invitilo, sendi vian salutmesaĝon. Elkore dankaj
ni diskonigos ĝin per la Supera Reto Bona Volo
de Komunikado al miloj da homoj – inter ili
multaj Esperantistoj –, de Brazilo kaj de aliaj
landoj, kiuj memorfestos tiun daton honore al la
Templo de Paco de LBV.*

Kun anticipa dankego, plej fratamike,

Maria Aparecida da Silva

www.paivanetto.com/eo

www.religiodedio.org

esperanto@bonavolo.com.

Ĉu vi deziras scii, kiel esti feliĉa kaj pli sana?

Ĉu vi rimarkis, ke zorgi pri via korpo ne sufiĉis por ke vi sentu
vin bone? Ĉu vi scias, ke la Amo povas esti la plej efika
strategio por ke oni ĝuu plenan sanon? Kiel diras la verkisto
Paiva Netto, "la homa organismo estas la plej eksterordinara
maŝino en la mondo. Eĉ tiel, ĝi foje paneas. Tamen, kun Amo,
eĉ kuraciloj prezentas pli bonan rezulton".

Kiel aliigi malfacilaĵojn al progreso?

Ĉu vi scias, ke eblas superi momentojn de grandaj defioj, eĉ kiam ĉio ĉirkaŭ vi ŝajnas neeltenebla? Ĝuste tiam ni bezonas trovi en ni eĉ pli da forto por venki ilin. Kiel trovi solvojn tie, kie ĉiuj vidas nur problemojn?

Ĉiujn tiujn respondojn vi trovas en la libro „Meditadoj el la Animo“, de la verkisto Paiva Netto. Ĉu vi jam partoprenas en nia lotumo por konkuri al tiu furoraĵo? Sufiĉas rekomendi la Blogon Paiva Netto al viaj geamikoj kaj ek! Musklaku sur la suba butono kaj vidu kiel plenumi tion, kun indikoj paŝe-post-paŝe.
el AMO

El la redakcio:

Saluton,

mia franca amikino Maggy, kiu vivas en Reunion, kreis esperanto-asocion ĉi tie kaj komencis instrui Esperanton. Ŝi nun serĉas korespondamikojn por siaj lernantoj. Ĉu vi interesiĝas pri reta korespondado?

Skribu al instruistino maggycombot@orange.fr.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ah@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovni spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ352010000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.